
Espéranto Angers

# La Letero

2019 - 01




---



# Alan Neven Kovacic (Kroatio) en Anĝevo !

## *De la 30a de januaro ĝis la 1a de februaro 2019*

Kadre de turneo en Francio, Alan Neven Kovacic, el Kroatio, baldaŭ haltos en Anĝevo.
Li laboras en la turisma kampo kaj ankaŭ kiel sendependa interpretisto. En Anĝevo, li prezentos prelegon. La loko kaj la horaroj ne estas ankoraŭ deciditaj. La temo probable estos "Kroatio, historio, kulturo, hodiaŭ...".
Dum lia restado, la membroj de Esperanto-Angers malkovrigos al Alan la urbon (kastelo, ktp...) kaj/aŭ la regionon. Eblas kuniĝi al la grupo (babiladoj en Esperanto, memkompreneble !).

**Pli ampleksaj informoj baldaŭ aperos en nia retejo :**
**www.esperanto-angers**

# Zamenhofa Tago 2018 - *sabaton la 8an de decembro*



*Jules Desbois*

Lastjare, la Esperanta Centro de Tours bonvenigis nin por tiu festo en la muzeo de Jules Desbois, skulptisto, en Parçay-les-Pins. Ni estis kvar partoprenantoj de la klubo de Angers. Post la vizito, klarigita de profesia ĉiĉeronino, ni tagmanĝis en alia vilaĝo. La restoracio akceptis ankaŭ afablan alian grupon. Tute nature, laŭvice, la gastoj de la du grupoj rakontis poemojn, muzikis, kantis sole aŭ kune. Estis tute agrabla tago.

**Jules Desbois kaj la muzeo**

La muzeo estas instalita fronte al lia naskiĝdomo, en la koro de la vilaĝo. Ĝi entenas ĉirkaŭ 160 verkojn en kvin salonoj.
Jules Desbois, franca skulptisto, naskiĝis en 1851 kaj mortis en 1935 (84 jaraĝa) en Parçay-les-Pins (departemento Maine-et-Loire, apud la Tours-regiono). Dum sia infanaĝo, Jules Desbois estis tre sendisciplina, moviĝema. Oni diris ke li ne estis destinata al lernado. Fakte, li enuis en lernejo kaj, jam tiam, li desegnis. Post kelkaj jaroj en atelieroj en Tours kaj Angers, li studis en Belarta Institucio en Parizo, kie li renkontis Auguste Rodin kaj amikiĝis kun li. Tuj poste, ili kunlaboris. Rodin ludis ĉefan rolon en la arta evoluo de Jules Desbois.
Liaj diversaj verkoj :
- la virinaj skulptaĵoj, el marmoro
- la mitologio
- la dekoracia arto (Novarto): vazoj, teleroj, medaloj, bustoj… Lia pli ŝatata materialo estis stano.

La temoj estas la esprimo de la mizero, de la maljuneco, de la alproksimiĝo al la morto kaj inspiritaj el la unua mondmilito.
**Tio ebligis verkojn neniam faritajn antaŭe kaj alportis al Jules Desbois famecon.**



*Kelkaj skulptaĵoj fare de Jules Desbois*





---

# Ĝis revido, Guy

La 17-an de januaro 2019, ni ĝisis al Guy GUÉTAULT [Gi Geto] en la kremaciejo de Tours.
Gi lernis Esperanton antaŭ ĉirkaŭ 20 jaroj, loĝis apud Tours kaj estis membro de la loka Esperanto-grupo.
Inter 2001 kaj 2009, li multe helpis kun la tiama skipo por la renovigado de la Esperanto Kulturdomo de Greziljono. Tie, li interalie refunkciigis la malnovan *akvo-batpumpilon*.
Poste, li ankaŭ renovigis tiun de *Montrésor* (apud Loches, 37). En tiu vilaĝo, li krome kreis karuselon sur la temo de tutmondiĝo de Esperanto, movigitan de tiu batpumpilo (vidu la ĉi apudan foton).
Li estis homo scivolema kaj kreiva, li multe ŝatis ripari kaj inventi teknikaĵojn. Per Esperanto, li (kun geamikoj) vojaĝis en Eŭropo kaj tre ŝatis renkonti eksterlandanojn okaze de kongresoj.
Ni ne forgesos la multajn laborajn kaj distrajn momentojn kiujn ni dividis kun Gi, amiko nia.



*Guy Guétault*



*La karuselo kreita de Guy Guétault en Montrésor*

---

**Espéranto-Angers**
3 allée du Haras, Appt 132, 49100 Angers, France
Tél. +33 (0)2 41 20 19 40 - http://www.esperanto-angers.fr - info@esperanto-angers.fr